ANNO LIII **Luglio - Agosto 2004**

BOLLETTINO D'INFORMAZIONE AI SOCI

SOMMARIO

- I nostri prossimi venerdì
- La forpaso de Glauco Corrado
- Publika prelego ĉe Kvartala Konsilio 8
- Informilano anche tramite la rete
- Gli amici ci attendono in Valtellina
- Grazie, grazie, grazie
- Nozze
- Turismo per Esperanto informa
- Condoglianze
- Estrarkunsido
- Kunveno "Mediterraneo plurilingue"
- La inaŭguro de strato Esperanto en Bolzano
- S. Vito al Tagliamento: una via a Paolet
- Vizito al lokoj pri Verdi
- Raporto pri manifestacio Eŭropa Bunto
- Kirek Seminario en Senigallia
- 3a Seminario pri interpretado
- Klaĉangulo
- Pier Vittorio Orlandini scrittore maremmano
- Niaj pasintaj vendredoj
- Congresso UEA Firenze: rassegna stampa
- Notizie dal mondo

Circolo Esperantista Milanese
Via De Predis 9 - 20155 Milano - tel. 347-4262214 *(solo venerdì sera)*
e-mail: esperantomi@infinito.it
rete: http://www.infinito.it/utenti/esperantomi/
C.C.P. 26448209

I NOSTRI PROSSIMI VENERDÌ ore 21,15

aperti a tutti gli interessati: soci e non soci

Venerdì 2 luglio
RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO

Venerdì 9 luglio
Dopo l'ultimo incontro prima delle vacanze in pizzeria (prenotarsi in sede o presso Rodari, tel. 022364190), in sede ci attende l'ing. Pranzo con una interessante conferenza su
ATTENTI A COSA SI DICE
un piacevole intrattenimento bilingue a sfondo semantico

Venerdì 16 luglio
Antaŭ la libertempoj jen la lasta
KONVERSACIA RONDO

LA SEDE È CHIUSA DAL 23 LUGLIO AL 3 SETTEMBRE BUONE VACANZE A TUTTI!

Venerdì10 settembre
TRAFOLIUMANTE LA ESPERANTAN GAZETARON

Venerdì 17 settembre
è aperta a tutti la
RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO
Venerdì 24 settembre
Ritorna la tradizionale pizza (vedi sopra per prenotarsi) e poi in sede per ascoltare le relazioni dei partecipanti su
I CONGRESSI DI PECHINO, TREVISO E CASTIGLIONE T.

VI SIETE ISCRITTI AL CONGRESSO DI TREVISO?

ATTENZIONE: il prossimo numero uscirà dopo il 15 settembre

LA FORPASO DE GLAUCO CORRADO

La 6an de junio abrupta infarto, dum trankvila familia ekskurso sur supreniranta monta vojeto de Valkamonika, senigis niajn klubon kaj italan movadon je unu el ĝiaj plej elstaraj reprezentantoj. Li naskiĝis en 1937 en Trieste, kie li finis la studojn kaj fariĝis membro de la loka E-Klubo, antaŭ ol transloĝiĝi al Milano pro laboraj kialoj. Ĉi tie dum preskaŭ kvardek jaroj li, agema membro kaj ankaŭ estrarano de Milana E-Klubo, precipe sin dediĉis al instruado: nenombreblaj liaj kursoj en la urbo kaj en la ĉirkaŭaĵoj, kun la sekvaj diversgradaj ekzamenoj. Li estis la aŭtoro de gramatiko Antares. Dum la lastaj tridek jaroj li fariĝis la motoro de milana Katolika Esperanto-Centro kiu, krom la kursojn prizorgis seminariojn, viglan kluban vivon kaj aliajn iniciatojn. La tutan vivon li agadis senlace kaj silente, ĉiam evitante sinlaŭdon kaj elstaremon, ecoj ne akordigeblaj kun lia karaktero pripensema kaj iomete timida. Ni ne forgesos lin.
La Milana E.-Klubo kaj ĉiuj s-anoj partoprenas en la funebro de la familio en tiu ĉi doloriga okazo.

publika prelego ĉe nia kvartala konsilio n° 8

Kiel anoncite, sabaton la 29an de majo je h. 15.30, Kvartala Konsilio gastigis nian Milanan Esperanto-Klubon ĉe sia Auditorio apud Centro Bonola por publika prelego pri la temo: “Kiel interparoli inter eŭropanoj: la eblaj solvoj”. Por tiu grava aranĝo akceptis la taskon tre elstara esperantisto kaj preleganto: prof. Giordano Formizzi el Verona Universitato, kiun oni denove dankas pro lia altnivela, informoriĉa kaj kuntrena prelego. Sed oni devas agnoski ke la rezulto estis pli malgranda ol la atendoj. Neniam oni esperis pri amasa partopreno en tiu granda aŭditorio, sed certe pri pli multnombra ĉeesto da scivolemaj nekonataj milananoj. Ne estas facile trafi la celon sen granstila reklamado se la temo ne havas aktualan eĥon pro ia samtempa kialo, kiu altiru la atenton. Certe la medio de tiu tre popola kvartalo ne helpas, sed nia klubo tie loĝas. Kontraŭe la respondo de niaj klubanoj estis pozitiva: ili estis multnombraj, malgraŭ kelkaj vere ne povis ĉeesti kaj kelkaj, konante tian temon, ne komprenis ke utilas doni bonan impreson al la ekstera mondo.
Post la taŭga enkonduko de nia prezidanto Polerani, la oratoro ekis donante informojn pri Esperanto kaj ĝia internacia movado, pri problemo kiu de ĉiam ekzistas, klarigante ke la parolo ne estas natura sed socia fenomeno kaj ke la manko de parolebleco signifas fiasko. La lingvo estas ankaŭ distinga karaktero de socia grupo, de popolo, de kulturo. Poste prof. Formizzi pritraktis la lingvajn rilatojn, tra la jarcentoj, inter superregantaj nacioj kaj dominitaj popoloj, ĝis alveni al Eŭropa Unio kaj ĝiaj nuntempaj problemoj. Per tre konciza sed preciza trarigardo, li ankaŭ resumis la klopodojn krei internacian lingvon neŭtralan, de la XVIIa jarcento ĝis la XXa, por solvi sentitan problemon evitante la lingvan koloniadon, kiu de ĉiam regas. Nun tion faras la angla, kontraŭ kiu esperanto ne intencas batali: estus pli utile alflankigi jam en la lernejo ilin: la nuntempan kaj la definitivan. Vera multlingveco ne estas ebla solvo sed nur kroma komplikaĵo. Je la fino de la prelego, kies resumo estas neebla sen damaĝi ĝian altkvalitan enhavon, ekis interesa debato kun demandoj fare de pluraj ĉeestantoj. Inter ili citendaj tiuj de s-anoj Montagner, Taccani kaj iuj aliaj. *E.R.*

INFORMILANO ANCHE TRAMITE LA RETE

Informiamo tutti coloro che ricevono il bollettino del nostro Circolo Esperantista Milanese che esso **a richiesta** può essere inviato anche per posta elettronica, con vantaggio per tutti: per il CEM e per il ricevente. Per il Circolo significa un risparmio economico in carta ed affrancatura, oltre che di lavoro. Per il ricevente, specie se abitante fuori Milano e quindi raggiungibile solo per plico postale, significa ricevere il bollettino subito anziché dopo 5-15 giorni e senza il pericolo che vada qualche volta perso, a causa della confezione alquanto precaria alla quale si è costretti per non superare il peso.
Tutti coloro che desiderano passare al nuovo sistema sono pregati di comunicarlo, insieme al proprio indirizzo di posta elettronica, al CEM o a Rodari: ermigi@infinito.it
Sarebbe inutile aggiungere che Informilano continuerà ad essere sempre inviato in forma cartacea a tutti gli altri.

GLI AMICI CI ATTENDONO IN VALTELLINA!

Una bella notizia: anche quest'anno gli amici di Sondrio organizzano l'autunnale simpatico incontro esperantista. Già fissate sia la data che la località: **domenica 24 ottobre a Sondrio.** Sul prossimo bollettino i

dettagli del programma, che sommariamente prevede:
ore 10.15 - Ritrovo e visita del Museo Valtellinese a Palazzo Sassi
ore 13.00 - Pranzo in tipico ristorante con specialità locali
pomeriggio: visita ad una minimostra esperantista con sorpresa finale.
Intanto **mettiamo in agenda questo piacevole impegno.**

GRAZIE, GRAZIE, GRAZIE

Pubblichiamo l'elenco aggiornato a giugno delle offerte fatte al nostro Circolo Esperantista da parte di Soci che, con generosità e sensibilità hanno voluto dare un ulteriore contributo alle sue attività:

Famiglia Santagata in		Polerani Gianfranco	50,00
memoria del prof.Pugnc	300,00	N.N.	45,00
Faiella Maria Luisa	98,00	Famiglia Ceffali	37,50
Famiglia Salani	70,00	Allanconi Giordano	35,00
La famiglia in memoria		Famiglia Martina	16,00
Di Vittorio Dall'Acqua	66,00	Sfardini Carla	11,00
Magnani Wanda	55,00	Altri	28,50

Come pure si desidera ricordare e ringraziare i numerosi Soci che con lo stesso spirito hanno voluto associarsi come Soci sostenitori:
Gustavo Bonvecchiato, Giampaolo Bottoni, Guido Carravieri, Anna Curatola Dall'Acqua, Maria Luisa Faiella, Serenella Giacchino, Gianfranco Polerani, Giuseppe Pranzo Zaccaria, Ermigi Rodari, Gianpiero Rodari, Adolfo Salani, Francesco Santagata.

NOZZE

Sabato 19 giugno ad Oliena, nel cuore della Sardegna, la sig.na Lucia Sanna ed il nostro socio Roberto Dall'Acqua si sono uniti in matrimonio, festeggiati da amici e parenti. Anche il Circolo Esperantista Milanese e tutti gli esperantisti partecipano alla loro gioia ed esprimono i più fervidi auguri di una vita felice e ricca di soddisfazioni.

TURISMO PER ESPERANTO INFORMA

Ecco l'aggiornamento definitivo del programma "Estate 2004" della nota agenzia del s-ano Aldo Foà in Via Casale 7- Milano. Tel. (dal lunedì al venerdì ore 17-19) 02 58 11 15 73 itaka@tiscali.it
Esso è reperibile anche sul sito **web:** http://web.tiscali.it/itaka/
- Tunisia, il mare e le oasi in nave e pullman *dal 5 al 19 agosto*
A Tunisi, Cartagine, Kairouan, attività balneare ad Hammamet e Djerba, villaggi berberi, oasi, ecc. **Quota € 790**
- La via dell'ambra,in pullman e nave *dal 6 al 22 agosto*
Tra natura ed arte. Andata in pullman tra i tre stati baltici fino a San Pietroburgo, sul Baltico da Helsinki a Stoccolma. **Quota € 879**
- Nell'impero di Carlo Magno in pullman *dal 7 al 15 agosto*
A Parigi, Treviri, Colonia, Paderborn, Wewelsburg, Aquisgrana, Munster, Amsterdam, Bruxelles, Lussemburgo. **Quota € 587**
- **USA: dal Texas alla Florida** in aereo e minibus *dal 7 al 23 agosto*
Attraverso il Missisippi, l'Alabama, la Louisiana, con Dallas, New Orleans, Miami, il centro Nasa, le spiagge di Key West **Quota** € 969
- **Messico ed Yucatan** in aereo e minibus *dal 8 al 25 agosto*
A Città del Messico, Chichen Itza, Uxmal, Canyon Sumidero, Taxco, Oaxaca, Tulum e Cancun con le spiagge caraibiche. **Quota € 887**

Le quote prevedono il viaggio in modo confortevole, i trasferimenti, i pernottamenti in camere doppie con servizi privati, le prime colazioni, le visite e quanto programmato.
Anticipazioni per il Capodanno: in allestimento viaggi di 6 gg. in *Andalusia*, di 5gg. a *Berlino*, circa 10 gg. in *Marocco*.

CONDOGLIANZE

Il nostro socio Giampaolo Bottoni è stato colpito nei suoi affetti più cari per la scomparsa della madre dopo lunga sofferenza. Il Circolo Esperantista Milanese e gli amici esperantisti sono vicini al suo dolore ed esprimono a lui ed ai famigliari il loro sincero cordoglio.

ESTRARKUNSIDO

La nova estraro kunsidis la 7an de majo kaj komencis per disdonado de la taskoj. Rekonfirmitaj la sekretario Rodari, la kasisto Pranzo kaj pluraj taskoj: la kultura agado al S. Giacchino, la bulteno al Rodari kun Pranzo kaj Polerani, turismaj aferoj al Foà, kiu prizorgos kun Pranzo ankaŭ la TTTejon, organizado kaj propagando al Ceffali kaj Conti kun la helpo de ĉiuj. La rilatoj kun milanaj aŭtoritatoj oni redonis al Taccani, kiu kun Daminelli prizorgos la kursojn. Al tiu ĉi lasta ankaŭ la rilatoj kun la Katedro. Nova estrarano Montagner

akceptis la kontaktojn kun ĉiaj amaskomunikiloj kaj partoprenas kun Ceffali kaj Rodari en la biblioteka komisiono, kies tasko estas ĝin reordigi. Poste oni revenis al la preterlasita problemo rekonfirmi prezidanton Polerani kaj vicprezidanton Foà, ĉar nia prezidanto ne volus plu esti tiu. Sed nenia alia solvo ebliĝis ĉar ĉiuj volus ke li akceptu. Post longaj senrezultaj klopodoj la du s-anoj daŭras en sia posteno "in prorogatio". Poste la Konsilio pritraktis ĉiujn organizajn detalojn pri la la publika prelego de prof. Formizzi ĉe Auditorio de Kvartalo 8, la partoprenon en seminarioj kaj inaŭguroj de esperantaj stratoj de niaj anoj kaj aprobis la aliĝon de CEM al internacia retlisto por la grupoj kiuj emas renkontiĝojn kun fremdaj s-anoj. La prezidanto konfirmis ke denove Provinco aprobis helpon al nia projekto favore al Esperanto. Fine oni informis ke s-ro Curnis de Alzano L., kiu ĉe ni unuagrade ekzameniĝis kaj estas fondonta asocion, intencas kunlaborigi ĝin kun esperanta movado kaj venos por havi konkaktojn.

E. R.

KUNVENO "MEDITERRANEO PLURILINGUE" EN ĜENOVO

Sponsorate fare de ELSAG (Finmeccanica Konzerno) kaj kunordigite fare de "Centro Internazionale sul Plurilinguismo dell'Università di Udine", oni kunvenis en Ĝenovo, de la 13a ĝis la 15a de majo, por pridiskuti pri plurilingveco kaj lingvaj entrudigoj rilate al la landoj kiuj borderas Mediteraneon.

Tridek referantoj pritraktis varion da situacioj kaj kuntekstoj pere de akurataj relegadoj kaj ekzamenoj de la pasinteco por kompreni sociajn kaj kulturajn evoluojn de ĉi tiu geografia areo.

Inter la pluraj temoj estas menciindaj la disvastigado de la itala lingvo la lingvaj interŝanĝoj kaj interagadoj pro la cirkulado de homoj kaj varoj en Mediteraneo, la integrigo dum la alta mezepoko kun la Norda Maro, la leksikaj postvivintaĵoj en izolitaj areoj, la lingvaj fosiloj en Ligurio kaj multaj aliaj temoj.

Preskaŭ la tuto de la prezentitaj memuaroj pritraktis nur pasintecon; do mi, je la fino de la dua labortago, kaj tuj post mia alia interveno pri la ĵus prezentita koncerna temo, atentigis la ĉeestantojn ke pasinteco utilas al kompreno de nuntempo, kiu povas siaflanke enlumi estonton, kaj konsiderinte ke en la norda arko de Mediteraneo kaj en ĝia centra parto troviĝas landoj de Eŭropa Unio, kiuj jam enhavas 20 malsamajn lingvojn, kaj sude troviĝas arabparolantaj landoj, estus bele uzi nun kaj ĉi tie pri la estonto ununuran vorton kiel semon de espero: "esperanto".

Gustavo Bonvecchiato

LA INAŬGURO DE STRATO ESPERANTO EN BOLZANO

La senĉesa agado de la bolzanaj esperantistoj, precipe de inĝ-o Karl Behmann kaj d-ro Renzo Segalla, kiuj ĉiam martelas la lokajn ĵurnalojn per leteroj kaj artikoloj pri la lingvaj problemoj kaj iliaj solvoj, fine donis pozitivan rezulton: urban straton dediĉitan al Esperanto. Vendrede la 14an de majo, posttagmeze, ĉe la ĉefa akceptoĉambro de la Komunumo okazis la oficiala inaŭguro dum solena ceremonio kiu kunigis la 37 novajn loknomojn, precipe stratojn, pretigitajn laŭ la lasta urboplano. Ĝin estris la urbestro adv-o Salghetti Drioli kun la helpo de la vic-urbestro, kiu prizorgis la tradukadon en la germanan lingvon. Post ĝenerala kaj klariga enkonduko, por ĉiu nova loknomo oni projekciis la mapon kaj foton dum la urbestro estis donanta informojn pri la persono aŭ la nomo al kiu oni dediĉas. Kiam inter la ĉeestantoj estis persono kun ia rilato kun la dediĉita nomoj (proksimume deko), jen paŭzo kun livero de memorŝildo, fotoj, k.t.p. La plej longa paŭzo okazis por strato Esperanto, ĉar en la salono aplaŭdis kvindeko da samideanoj alvenintaj el pluraj regionoj de norda Italio. Oni liveris du memorŝildojn: al la estrino de la bolzana katedro prof.ino Lea Fabbri kaj al inĝ-o Behmannn, kiu adresis siajn dankojn kaj al la lokaj aŭtoritatoj kaj al la ĉeestantaj esperantistoj. Estis ceremonio tre bone organizita kiu finis per vere luksa kaj riĉega regalado.

E.R.

SAN VITO AL TAGLIAMENTO: UNA VIA A PAOLET

Lo scorso 29 maggio, nel quadro della 6° settimana culturale, con una bella cerimonia in Municipio è stata inaugurata una via dedicata ad Antonio Paolet, famoso pioniere dell'Esperanto in Italia e piccolo editore. Nel cavedio sono stati esposti i libri di esperanto ora difficilmente reperibili, da lui pubblicati. La conferenza ufficiale è stata tenuta dal prof. Carlo Minnaja che ha ricordato tanti fatti e luci della vita di Antonio Paulet. Anche la sua unica opera letteraria nota,

una breve commedia teatrale. È stata una riunione felice, un ritrovare gli amici esperantisti friulani e rivedere ancora vivo Paolet (o Paulet) effigiato nella figlia Giuseppina lucida benché ultranovantenne.
Antonio Paulet è la gloria di tutta la sua famiglia che lavorò anche per far emergere lui, che arrotondava i bilanci magri insegnando stenografia, e che aveva deciso di donare al Mondo i tesori della nuova lingua Esperanto, razionale, ben progettata, subito viva e capace di affratellare i popoli.
(*dall'articolo di G. P. Bottoni* con foto visibili su http://math.cilea.it/b?eo/paulet)

VIZITO AL LOKOJ PRI VERDI

Pro iniciato de pastro Carlo Capuzzi kaj zorge de Fidenza Esperanto-Grupo "Renzo Sommi" la 6-an de junio okazis vizito al lokoj de itala sed mondfama muzikisto Giuseppe Verdi, en kiu partoprenis 25 esperantistoj alvenintaj el Bergamo, Bolonjo, Milano kaj Parma.
La renkontiĝejo estis fiksita en la nova vilaĝo kun komerca centro proksime de la elirejo el la aŭtoŝosejo ĉe Fidenza: post mallonga halto en ripoziga trinkejo ni iris al urbeto Soragna, kie ni vizitis la hebrean muzeon titolitan al Fausto Levi.
Ni transiĝis poste al la Dioceza Sanktejo "Madono de la herbejoj", kie pastro Capuzzi celebris la Sanktan Meson: en tiu ĉi sanktejo estas zorge konservita kaj videbla harmoniumo uzita de la iama knabeto Giuseppe Verdi. Sufiĉe proksima estas la modesta sed bone konservita naskiĝdometo de Verdi: antaŭ ĝi estas bela monumento memore al li.
Post bona tagmanĝo en apuda restoracio la partoprenantoj vizitis en Fontanellato la imponan "Rocca San Vitale" kaj, en la loka preĝejo de Sankta Kruco, bone konservitan lignan sakristion.

G.F. Polerani

RAPORTO PRI LA MANIFESTACIO EUROPA BUNTO 2004

La 9-a de majo 2004 estis tre pozitiva tago pri pluraj aferoj. Malgraŭ la distanco kaj la malbona vetero, pli ol 300 homoj kunamasiĝis en Strasburgo: la manifestaciintoj estis venintaj el ĉiuj partoj de Francio sed ankaŭ pluraj alvenis el Germanio, el Belgio, el Svislando, el Britio kaj eĉ el Serbio.
Ekde la 10-a horo, la partoprenintoj amasiĝis progresive sur la Placo de la Universitato. Post kelkaj bonvenigaj vortoj de Denis-Serge Clopeau, pluraj partoprenantoj salutis la publikon en sia gepatra lingvo. Oni tiam menciis la nomojn de la 33 asocioj, kiuj estis alportantaj sian apogon al la manifestacio. La koncerto de jOmO estis tre ŝatata de ĉiuj kaj tiklis la atenton de la strasburga publiko.
La manifestacio ekis la 14-an kaj duono. La kunirantaro en la aleo de la Robertsau estis sufiĉe impona pro ties longeco kaj ties multeco da banderoloj, krom la aŭdeblaj sloganoj. La partoprenantoj iris ĝis antaŭ la Eŭropa Parlamento. Tie, sub sufiĉe forta pluvo, oni rapide konkludis la manifestacion kaj la partoprenantoj disiĝis je la 16a horo
La tago ne estis tute finita ĉar ankoraŭ estis la debato ĉe Eŭropa Parlamento. La debato estis bon-nivela. La ĉeftemo estis: kiel eviti lingvan diskriminacion kaj ebligi multlingvismon laŭ la fundamentaj tekstoj de la Eŭropa Unio? La tago estis sufiĉe bone priparolita en la amasinformiloj: la televidkanalo France 3 Alsace, la regiona ĵurnalo Dernières Nouvelles d'Alsace, pluraj radio-stacioj.

(el la raporto de Henrii De Sabates)

KIREK-SEMINARIO EN SENIGALLIA

La 12an kaj la 13an de junio tiu ĉi agrabla urbeto gastigis bone organizitan, ankaŭ je la loĝiga vidpunkto, seminarion pri Kirek, en kiu partoprenis dekvar interesitoj, respondeculoj aŭ korektantoj.
Oni starigis tri laborgrupojn. En la unua la jam komisiitoj pri la revizio de la nova teksto de la kurso, kiu estas pli kompleta kaj altnivela, kun la ebleco havi ankaŭ aŭdan kunligon, sed evidentigis kelkajn misklarigojn aŭ malfacilaĵojn. Oni lerte laboris kaj oni esperas ke la organiza respondeculo Francesco Maurelli sukcesos pretigi la definitivan tekston antaŭ la fino de septembro. En ĝi tute malaperos la nuna enkonduka "leciono n° 0", kies celo estas, antaŭ ilin asigni al korektanto, forigi tiujn kiuj aliĝis erare, aŭ por ŝerci, aŭ poste ŝanĝis intencon. Ĉar oni konstatis ke ĝi estas tro malfacila kaj malkuraĝiga por la ĵus aliĝinta lernanto, kiu tro ofte tuj rezignas. Oni anstataŭos ĝin per demandaro kiu eĉ permesos kolekti utilajn kaj statistikajn informojn. Dum kelkaj korektantoj preferis ĉeesti en grupeto estrita de s-ino Anna Lowenstein celante pliperfektigi proprajn lingvajn konojn, la aliaj starigis trian laborgrupon, kiu interesiĝis pri problemoj kunligitaj kun la organizo, la varbado, la

plenumado de la kursoj kaj la rimedoj por klopodi aktivigi en la movado la novajn diplomitojn. Oni decidis kontroli ke ĉiuj korektantoj havu bonan konon de la internacia lingvo per laŭcela skriba ekzameno sendenda al ili fare de Komisiono. Oni konstatis ke la rilato kun la lernanto devas progresi psikologie paŝo post paŝo, klopodante kompreni liajn preferojn, kaj plurajn aliajn konsilindajn kondutojn. La plej grava sed malfacile solvebla problemo estas kuntreni la diplomitojn en la movado. Jam oni sendas al ili nian revuon dum unu jaro, oni donacas la aliĝon al nia kongreso ...sed oni devas ne forgesi ke ili elektis retan kurson aŭ pro manko da tempo por vizitadi iun tradician aŭ eble ĉar ili principe emas vivi en telematika mondo, antaŭ sia komputilo. Pro tio estas tre interesa kaj utila la propono de s-ino Daniela Bottegoni, kiu estas preta telefone kontakti ĉiujn diplomitojn por klopodi ilin informi pri nia asocia vivo, kun aparta atento pri iliaj preferoj, kaj konvinki partopreni. Krome oni provos organizi renkontiĝon por Kirek-anoj, eble en Bolonjo kaj poste en Napolo.

E. R.

3-a SEMINARIO PRI INTERPRETADO EN TRENTO

Dum la lasta semajnfino de majo 2004 (de la 28.a ĝis la 30.a) okazis en Trento la 3-a seminario pri interpretado, unu el la serio da staĝoj organizataj de IEF kune kun IEJ cele al trejnado de homoj, kiuj aktivos dum la UK Florenco 2006. Kun mi partoprenis dekduo da lernantoj gvidataj de Michela Lipari. La seminario komenciĝis sabaton matene ĉe la sidejo de la E-klubo de Trento, por la teoria parto. Postagmeze kaj dimanĉon matene, por la praktika laboro, ni iris turisme tra la urbo, gvidataj de Maria Lucchi kiu rolis kiel itala ciceronino kaj, laŭvice, ni ĉiuj estis alvokataj traduki simultane ŝiajn eksplikojn. Sabaton postagmeze ni iris precipe tra la urbovojoj kaj dimanĉon ni vizitis la Katedralon kaj la Kastelon. Fine de la du ekskursoj, Michela komentariis niajn interpretadojn kaj oni pridiskutis la tuton. Interalie estis bela vetero kaj la urbo estis ornamita per buntaj floraj bedoj okaze de la manifestacio "CITTÀ FIORITA" kaj estis viglita de etnaj muzikoj okaze de la "FESTA DEI POPOLI", do ni povis aldoni al la utilo la plezuron de la okuloj kaj de la oreloj.

Giovanni Daminelli

KLAĈANGULO

La temo de la lasta prelego, aŭ skeĉo de nia s-ano Ĝianni Conti estis: "Eble ni eraris ĉion" kaj tuj jen la unua eraro en la titolo mem, ĉar la verbo "erari" ne permesas la akuzativon. Kia kohero kun la temo mem de la prelego!

En Italio, kvankam ne ĉiuj scias tion, oni povas sendi al Prezidanto de Respubliko leteron sen aldoni kroman adreson. Laŭ FEI-afiŝo pri nia kongreso en Treviso, la samon oni povas fari kun la fama estrino de la Kongresa Komitato. Ĉu vi volas informojn? Vi povas elekti inter www.esperanto.it aŭ "petu al Flavia Dal Zilio". Sed ĉu Poŝtoj scias?

.....

Alia enigmo: la sama anoncafiŝo montras du interkisantajn stilizitajn ŝtofajn bestetojn. Sur konfuza fono oni divenas vesparon. Kiuj ili estas? Simbolai flugiloj malpermesas pensi al dikaj silkraŭpoj aŭ al Juventus-emaj kokcineloj.

.....

Kiu senhelpe sukcesos sendi koverton kun la solvo al s-ino Dal Zilio eble gajnos senpagan aliĝon al la Itala Kongreso.

S-ano Ricagno, itala komisiito pri propagando, prave asertas en sia mesaĝo ke por manifestoj aŭ gadĝetoj necesas spertulo. Kiel pruvo jen lia ŝoka propono: slogano kun tiu ĉi teksto: "Fumantoj tuj senkapiĝos". La slogano, kaj eĉ pli ĝia nefidela itala traduko, estas laŭmode Al Qaeda-emaj. Ŝajnas ke CIA kaj FBI kaŝe enketas pri li.

PIERVITTORIO ORLANDINI SCRITTORE MAREMMANO

Sempre disponibile ma riservato, egli non fa mai pesare la sua presenza, per quella sua innata modestia che lo distingue. Ma c'è.
Ora si avvicina il Congresso Universale di Firenze 2006 e tra i tanti interessi che susciterà fra i partecipanti c'è anche il conoscere meglio la regione ospitante, la Toscana molto nota anche all'estero. E lui, un inguaribile innamorato della sua Maremma e di Grosseto, sta mettendo a punto tre sue belle e significative opere in esperanto:
EKSKURSO TRA LA PRIMAREMA LITERATURO – Brani scelti di Dante, Fucini, Carducci ed altri scrittori "minori" con poesie, racconti, ecc. illustrati con foto a colori e bianco e nero di paesaggi, capolavori e dipinti di artisti famosi come ad esempio Fattori. Pagine 114. Già disponibile al prezzo di € 17.

RIGARDO TRA LA PROVINCO DE GROSSETO - In questa voluminosa opera viene raccontata la storia della provincia di Grosseto, il suo ambiente naturale e soprattutto le sue opere d'arte. E' illustrata con belle foto a colori che fanno però lievitare il prezzo. Quindi ancora in via di definizione come aspetto, stampa e prezzo.
GROSSETO **-** È una guida turistica e storica della città, della quale descrive le parti più interessanti da visitare. In esperanto. Anch'essa riccamente illustrata da belle foto sia a colori che in bianco e nero. Pagine 78, prezzo € 15, per ora non ancora disponibile.

NIAJ PASINTAJ VENDREDOJ

Aparta vendreda programo estis tiu de la 21 de majo kiam, post la gaja ...antaŭkunveno en picejo, en sidejo rolis nia fantaziema amiko s-ano Gianni Conti, kiu prezentis sian lastan skeĉon, aŭ mallongan unuaktan komedion, kies titolo estas "Eble ni eraris ĉion". Sur du vandoj de nia sidejo li apogis panelojn kie oni listigis la nomojn kaj la aŭtorojn de mil artefaritaj lingvoj, pristuditaj por seriozaj aŭ amuzaj aŭ apartaj celoj, kies tre granda parto ne havis ian sekvon, por substreki ke la homoj ĉiam havis intereson por ili. Li, kun serioza mieno kaj armita per lumiganta desegno-projekciilo, komencis montrante statistikojn, enketojn kaj konkludojn, citante du japanajn sciencistojn, kompreneble inventitajn. La parolado fariĝis iom post iom pli paradoksa, precipe kiam li pritraktis la modernajn aparatojn por aŭtomata tradukado. Kun praktikaj provoj per stranga skatolo. Je la fino jen la lastaj malkovroj kiuj pruvas ke vere taŭgan solvon trovis la katoj. Fakte oni konstatis ke ĉiuj rasoj de katoj perfekte interkompreniĝas per la kata lingvo. Do, fine li donacis al ĉiuj ĉeestantoj paketon kiu enhavus tradukaparaton per kataj lingvoj.
Transdonante al esperanto la saman nedistingon de la itala lingvo pri "lingvo kaj lango", la aparato konsistis surprize en iom da "kataj langoj", la bongustaj kaj famaj dolĉaĵoj, similaj al etaj biskvitoj.
Vendredon la 11an de junio, okaze de la 25a datreveno de la morto de nia neforgesebla Vittorio Dall'Acqua, s-ano Ermigi Rodari prelegis pri li, elprenante el la arkivo de l' memoro okazaĵojn, iniciatojn, anekdotojn,k.t.p. Li komencis memorante ke li kaj Vittorio samtempe kaj junaj alvenis al la milana klubo, amikiĝis kaj simbioze vivis kune 24 jarojn da esperantista vivo. Poste li resumis liajn vivon kaj brilan karieron: de la unua prelego ĝis la FEI estraraneco, tra lokaj kaj naciaj taskoj, organizadoj, artikoloj, verkoj, partoprenado en pluraj instancoj kaj konkursoj, k.t.p. Li substrekis la rigore moralajn ecojn, la eklektikismon de la amiko en pluraj kampoj, de poezio al literaturo, de tradukado al recenzoj, de desegnaĵo al pentraĵo, de teatraĵoj al ĝiaj ludadoj, k.t.p. Aparta atento estis dediĉita al lia fama noviga gramatiko kaj al lia vortaro esperanta-itala kiu neniam estis eldonita ĉar tiu kiu akceptis kompletigi ĝin, post lia morto, longtempe haltis ebligante pli fruan pretigon de alia vortaro. Fine la preleganto informis pri Literatura Premio V. Dall'Acqua en lia memoro kaj legis tri memorigaĵojn verkitaj pro lia morto, inter kiuj tiu, la plej signifa, de d-ro Corsetti rekonante la grandajn meritojn de persono kun kiu li havis ideologiajn malkonsentojn (ofte malprave kiel historio pruvas).
Krome la 16an de majo pro laboraj kialoj venis al Milano s-ano Tom Rubinstein el Kalifornio kiu volis renkontiĝi kun milanaj s-anoj por vespere kafeumi kaj babili.

CONGRESSO UEA FIRENZE 2006: RASSEGNA STAMPA

Anche se il 2006 sembra ancora lontano, il LKK sta già lavorando da tempo per l'organizzazione del Congresso Mondiale dell'UEA di Firenze e anche la stampa se ne sta già occupando e se ne occuperà sempre più nei mesi a venire.
A tale proposito **chiedo la collaborazione di tutti,** affinché mi segnalino ed inviino tutti gli articoli, articoletti, comunicati che abbiano a che fare con il Congresso del 2006. Quindi chiunque troverà sulla stampa locale, nazionale, internazionale menzione al congresso, è pregato di darmene informazione, al fine di predisporre una accurata rassegna stampa.
Il materiale può essere inviato per posta cartacea al mio indirizzo di Via Montanara Sud 91, 46010 Campitello (MN) o per posta elettronica con scannerizzazione dell'articolo a lbrazza@libero.it.
Certa della collaborazione
Laura Brazzabeni - *commissione "informado UKFirenze 2006"*

NOTIZIE DAL MONDO

Castiglione Torinese – Qui si svolgerà dal 10 al14 settembre il 18 congresso dei cattolici esperantisti italiani. In programma, oltre all'inaugurazione e all'assemblea, tre relazioni, S. Messe in esperanto, tre serate e due giorni di escursioni. Informazioni: s-ano Gianni Conti

Ancona – Grazie al notevole lavoro d'informazione dei s-ani dott. Grassini e Menghini sulla dichiarazione della FEI contro la discriminazione linguistica in EU in occasione delle elezioni, questa è stata sottoscritta da sei partiti (Margherita, Ds, Rifondazione, PDCI, Repubblicani Europei e Radicali, che però l'hanno giudicata troppo riduttiva) e da altri 33 candidati dei suddetti partiti ed anche di FI, AN, UDC, UDEUR, Verdi e Lista Di Pietro-Occhetto.

Cormano (Milano) – Alcuni corsi presso la locale Università della Terza Età alla fine del ciclo 03-04 hanno presentato un saggio finale. Fra essi quello di esperanto, con due allievi, Ivonne Stagni e Giovanni Foletto, che hanno recitato un breve atto unico in lingua internazionale, con la regia del loro insegnante Gianni Conti.

Francoforte s/Meno – Il locale gruppo esperantista, gemellato con Milano, sta organizzando i festeggiamenti per il suo centenario, che avranno luogo il prossimo 30 ottobre. Intanto l'ultima assemblea ha riconfermato alla presidenza la s-ino Katarina Eckstadt.

Pescara – Presso la scuola media cittadina Benedetto Croce, lunedì 31 maggio si sono svolti con successo, davanti ad una qualificata Commissione, gli esami di primo grado degli alunni, che avevano seguito un corso di esperanto condotto dalle prof.sse Daniela Campitelli e Annamaria Colacicchi grazie ad un "laboratorio linguistico" utilizzante anche le nuove tecnologie informatiche.

Mantova - Su iniziativa dell'assessorato alle politiche sociali della Provincia, il Centro di Educazione Interculturale in collaborazione con il gruppo esperantista ha condotto il 26 maggio un "tavolo della pace" con un incontro con il prof. Formizzi sul tema: "La pace: una conquista personale e sociale". Con l'occasione il Centro ha anche presentato il quaderno "Esperanto la lingua della pace"

Trieste – La locale associazione esperantista ha allestito una mostra di pittori di più nazioni "Artisti della Mitteleuropa" presso la Sala Comunale d'arte di Muggia. Inaugurata il 3 giugno scorso.

Vicenza – Dal 24 al 27 giugno, il Centro Esperantista di Vicenza ha partecipato con uno stand a Festambiente, una nota festa ecologista.

Castello di Gresillon (Francia) - Gli interessanti programmi culturali e di vacanza per quest'estate presso il famoso centro esperantista sono reperibili su: http://grezijono.kastelo.free.fr

Trento – il 16 maggio esperantisti di Bolzano e Trento hanno allestito un gazebo con materiale informativo alla Festa dei Popoli.